WIKIPEDIA

Slovaka lingvo

La **slovaka lingvo** (slovake *Slovenčina*) estas unu el okcidentslavaj lingvoj, kiu plej similas al la ĉeĥa lingvo. Ĝi estas la nacia lingvo de Slovakio.

Slovaka lingvo	
Slovenčina	
Parolata en	Slovakio
Parolantoj	7 000 000
Denaskaj parolantoj	6 milionoj
Skribo	latina
Lingvistika klasifiko	
Hindeŭropaj lingvoj	
Slavaj lingvoj	
Okcidentslavaj lingvoj	
Slovaka lingvo	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Slovakio, Vojvodino
Reguligita de	Slovak Academy of Sciences
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	sk
ISO 639-2	
Bibliografia	slo
Terminologia	slk
ISO 639-3	slk
SIL	SLO *(Pri Slovaka lingvo (http://www.sil.org/iso639-3/documentation.asp?id=SLO) en SIL angle)*
Glottolog	slov1269
Angla nomo	Slovak
Franca nomo	slovaque
Vikipedio	

Enhavo

Nombro de parolantoj

Historio

Fonetiko

Gramatiko

Deklinacio

Vidu ankaŭ

Eksteraj ligiloj

Nombro de parolantoj

Slovake oni parolas en Slovakio (ĉirkaŭ 5 milionoj da homoj) kaj krome en tiuj ĉi landoj (*menciitaj estas nombroj de Slovakoj en eksterlando laŭ (slovakaj landaj komunumoj kaj ambasadejoj)/oficialaj nombroj por jaro 2000/2001*):

- en Usono (1 200 000/821 325)
- en Ĉeĥio (350 000/183 749)
- en Hungario (110 000/17 693*) – * sed kapablecon paroli mencias 68 852 da personoj
- en Kanado (100 000/50 860)
- en Serbio (60 000/59 021) – ĉefe en Vojvodino
- en Pollando (47 000/2 000*) – * Ĉefa cenza komisio akceptis malkonsenton de Slovaka Komunumo kontraŭ tiu ĉi nombro
- en Rumanio (18 000/17 199)
- en Ukrainio (17 000/6 397) – ĉefe Karpata Rutenio
- en Aŭstrio (10 234/10 234)
- en Kroatio (5 000/4 712)

kaj en aliaj landoj. Verŝajna nombro de Slovakoj en eksterlando en jaro 2001 estis 2 016 000.

Historio

Oni supozas, ke jam en 9a kaj 10a jarcentoj ekzistis tri dialektoj: okcidentslovaka, mezslovaka kaj orientslovaka. Ek de 10-a jarcento oni uzis slovakan lingvon nur en limigita dimensio, en 13-a jarcento fariĝis oficiala lingvo la latina. Ek de 15-a jarcento oni uzadis en skriba formo la ĉeĥan lingvon, kiun enpenetris slovakismoj. Iom post iom ekestis tiel nomata kultura slovaka lingvo, kiu disvolviĝis en du formoj: kiel kultura okcidentslovakia kaj kultura mezslovakia dialektoj. Kultura okcidenslovakia dialekto fariĝis grava etapo en transiro de la ĉeĥa al la unua literatura slovaka lingvo, kiun leĝigis Anton Bernolák. Kultura mezslovakia dialekto fariĝis bazo por literatura lingvo, kiun leĝigis Ľudovít Štúr. En la jaro 1851 ekestis interkonsento inter ambaŭ grupoj – Bernolak-anoj kaj ŝturanoj kaj oni akceptis unuecan literaturan lingvon, kies bazo fariĝis mezslovakia dialekto. Estis akceptita gramatiko, korektita de Hattala. Per eldono de *Mallonga gramatiko de slovaka lingvo* (1852), estis donita fundamento de novepoka literatura lingvo.

Fonetiko

Slovaka lingvo havas vokalojn : u, o, a, e, i, y, ä (prononcata kiel e), kiuj ekzistas ankaŭ en longprononca formo : ú, ó, á, é, í ; ĝi havas diftongojn : ia, ie, iu, uo (= ô). Konsonantoj en slovaka lingvo estas: p, t, k, b, d, g, ť, ď, c, č, dz, dž, f, v, s, z, š, ž, ch, h, m, n, ň, l, ľ, Ĺ, r, ŕ, j. En slovaka lingvo oni signas ĉiun sonanton per unu litero kaj male. Escepton formas konsonantoj ch, dz, dž. Malan escepton fomas i – y. Per la literoj i – y oni signas la saman sonanton. En la prononco ne estas inter ili diferenco. En fremdaj vortoj oni uzas ankaŭ pluajn literojn : q, w, x.

Proksimuma prononcado de la slovaklingvaj literoj:

skribitan	prononcu kiel
č	ĉ
ň	nj
š	ŝ
ť	tj
ž	ĵ
ä	e
ch	ĥ
ô	ŭo
ď	dj
y	i
ľ	lj
dž	ĝ

Kvankam la slovaka lingvo longtempe disvolviĝis en aliaj kondiĉoj ol la ĉeĥa, ambaŭ restis tre similaj. Slovaklingve parolas en Slovakio preskaŭ 90 % el la popolo. Multaj Slovakoj vivas en Ĉeĥio, Usono, Hungario, Pollando, Kanado, Rumanio, eksaj Sovetunio kaj Jugoslavio kaj en aliaj landoj.

Gramatiko

Deklinacio

Pli detalaj informoj troveblas en artikolo Deklinacio en la slovaka lingvo.

Vidu ankaŭ

- Slovake.eu
- Lingvoscienco
- Listo de lingvoj
- Lingva familio

Eksteraj ligiloj

- Slovake.eu (http://www.slovake.eu/eo/) – senpaga multlingva paĝaro por konatiĝo kun kaj lernado de la slovaka lingvo, kreita de E@I esperante

Slava lingvaro		
Okcidentslavaj	ĉeĥo-slovakaj (ĉeĥa lingvo • slovaka lingvo • knaana lingvo) • soraba lingvo (suprasoraba lingvo • malsuprasoraba lingvo) • leĥaj lingvoj (pola lingvo • pomoria lingvo (kaŝuba lingvo • slovinca lingvo) • polaba lingvo)	
Sudslavaj	okcidentaj sudslavaj lingvoj (kroata lingvo • bosna lingvo • montenegra lingvo • slovena lingvo • serba lingvo • serbokroata lingvo) • orientaj sudslavaj lingvoj (makedona lingvo • bulgara lingvo • malnovslava lingvo) ...	
Orientslavaj	belorusa lingvo • ukraina lingvo • rutena lingvo† • rusina lingvo • rusa lingvo • Malnova Novgoroda dialekto†	

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Slovaka_lingvo&oldid=6773113"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 13:22, 30 okt. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.